Ĉar la kisoj faras tiom da homoj feliĉaj, kiel ankaŭ sammultajn malfeliĉaj, estas kompreneble, ke oni volas klarigi al si tiun ĉi eĉon en la homa koro kaj samtempe, laŭ la ofteco, maniero ktp., konkludi la karakteron de la popoloj.

La demando, kiu popolo plej bele kisas, ne estas respondebla facile, ĉar eĉsepte kelkaj negraj gentoj, al kiuj jam sufiĉas la reciproka ĉirkaŭpreno de la nuko, kaj mongolaj gentoj, ĉiuj aliaj popoloj preferas la kisadon al multaj aliaj aferoj.

La maniero de la kisado dependas de la tre diversaj idealoj pri beleco kaj kareso, kaj tio sekvigas, ke oni ne povas ĝenerale juĝi, kiu nacio kisas plej bele. En la okcidento oni juĝas la viron laŭ liaj kapabloj en la kisarto, dum en la oriento estas la kontraŭo. Laŭ tio klariĝas ankaŭ la signifo de la kiso en oriento kaj okcidento; la unua estas speciale voluptema kaj sklaveca sindono, dum en la lasta ĝi estas pli sincera signo de vera amo. Se oni juĝas la kison kiel esprimon de pasio, ardanta pasio, tiam la orientaninoj, ricevas la unuan premion, ĉar en la iamaj haremoj, kiuj nun laŭleĝe en Turkujo estas forigitaj, la kisarto havis variecon, kiu nur estas eble ĉe homoj

kies pensoj kaj agoj estas grave influataj de amaj impulsoj.

Jam en la mondkonataj rakontoj el 1001 *noktoj* oni legas, kiomege estas progresintaj la orientaj inoj en kisado, kaj multaj gentoj distingiĝas per la speciale belaj praktikoj. Oni legas pri la ĉirkaŭprenoj de la Kairaino, pri la fleksebleco de la virinoj de la delto de l' Nilo kaj pri la persistemo de la inoj de Daniato.

La japanino, kiu kredas sian vivon fuŝita, se ŝi ne havas la feliĉon transdoni sin al viro, povas esti la plej aminda estaĵo en la mondo, sed kisi ŝi ne scias. Kiam ŝi kisas, ŝi metas delikate sian buŝeton sur la buŝon de la viro, mallonge, nenion esprimante, kiel bona infano, al kiu la patrino ordonis kisi parencon.

Ravanta estas la kiso de la virino de Javo. Viroj el la okcidento, kiuj en tiu ĉi punkto estis bongustumemaj, kaj amis inojn de Javo rakontis mirigajn historiojn pri ili. Ŝi vivigas per sia danco kaj mortigas per siaj kisoj. Pro tio ŝi dancas postkiam ŝi estis kisinta kaj kisas postkiam ŝi estis dancinta. Se ŝi petas ion, ŝi estas kvazaŭ petanta hundeto, se ŝi dancas ŝi iĝas virino, sed se ŝi kisas ŝi estas diino. Ŝi kisas, kiel infano suĉas la patrinan bruston, sed tio estas afero de propra gusto.

Por la mongolaj popoloj la kiso estas superflua. Ili rezignas la prekludon de siaj amaj aferoj kaj preferas la « in medias res ».

Volonte kaj multe kisas la rusinoj, sed ne estas kiso de amo, sed kiso de devoteco. Ĝi estas malvarma kaj seka.

Nepoloj ne povas kompreni, kiel viroj povas sopiri al la kiso de la polino. Oni tuj seniluziĝinte ektuŝas la dentojn kaj la atendita molaĵo de la lipoj estas ŝmirajo.

Ne pli bone en tia rilato estas la hungarino. Ŝi scias arde ami, sed kisi ne. Ŝi ne nur kisas kun la lipoj, sed ankaŭ kun la ŝultroj, la brakoj, la manoj, la brusto kaj la koksoj. Al la viro certe fariĝas tre varme, sed tio ja ne estas kisado. Kisi oni nur povas kun la buŝo; ĝi devas esti spiro de la animo kaj ne korpa moviĝo.

(daŭrigota) el germ. Joh. Bernhard, München
(repr. kaj trad. malporm.)

SCIENCO KAJ VIVO

Ĥina lingvo.

Oni certe supozas, ke en Ĥinujo estas dialektoj tiel malsamaj kiel franca al angla, aŭ germana al rusa; ke loĝantoj de urbo A bezonas tri-kvarjaran studadon por ellerni la lingvon de urbo B; ke ne estas kompreniĝo eĉ inter geedzoj kiuj naskiĝis en malsamaj provincoj; ke troviĝas grandega malhelpo por fremduloj, kiuj intencante eklerni Ĥinan lingvon, embarasite ŝanceliĝas elekti kiu lingvo por li estas bezonata; ke Ĥina vojaĝanto devas scii 10-20 lingvojn; k. t. p., k. t. p. Tiu ĉi supozo estas certa al tiuj, kiuj el la libro aŭ pri diro scias ke multaj dialektoj troviĝas en Ĥinujo.

Jes, estas dialektoj en Ĥinujo, sed la supredrita supozo estas erara.

Ĥina lingvo diferencigas inter buŝa kaj skriba, sed la skriba lingvo tre influas al la buŝa, tial Ĥinaj dialektoj pli malpli sekvas post la Ĥina skribo dum 2,000 jaroj en sia ŝanĝiĝo. Jen mi skribas pri la skriba lingvo de Ĥinujo.

Ĥina lingvo skriba estas ideografio. Ĝin elpensis antaŭ 4,000 jaroj iu saĝulo. La primitiva formo tre similas la naturan figuron. Poste por plifaciligi la skribadon oni iom post iom aliĝis ĝian elementojn. Nuna figuraro de l' Ĥina lingvo estas jam fiksita en sia formo antaŭ du mil jaroj, kiu restas sensanĝo ĝis nun. Ni facile tralegas flue la librojn verkitaĵajn antaŭ 2,000 jaroj. Nordlandanoj legas ĝin tiel klare kiel la sudanoj. La tiel nomita dialekto neniam troviĝas en Ĥina verkajo kaj ankaŭ nenie.

Sed la Ĥina parolo ne dependas de la skribajo mem; tial sama vorto-figuro posedas malsamajn elparolojn al la loĝantoj, unu malproksima al la alia. Jen estas la dialekto de Ĥinujo.

Sed skribajo tute estas sama kiel mi diras antaŭe, tial la dialektoj ne estas tre malkompreneblaj al iu ajn Ĥino.

Ĉiu Ĥina vorto-figuro havas nur unu nomon, Silabo, kiu konsistas el 2-3 aŭ pli da figuroj t. e. silaboj, ekz: ren (homo), ma (ĉevalo), poli (vitro) k. t. p. Oni povas vidi, ke en ĉiu silabo ankaŭ troviĝas konsonanto kaj voka-

lo. Ĝenerale en malsamaj dialektoj la konsonantoj estas samaj kaj nur la vokaloj ŝanĝiĝas. Cetere en ŝanĝiĝo de l' vokaloj ankaŭ iras regule jaron post jaro, unu urbo apud alia, tiel ke oni kaptante unu ekstremon, povas enmanigi la tutan serion. Pro tio la Ĥinoj ellernas la dialektojn de alia provinco senlerne dum 3-6 monatoj, kaj komprenas ilin nur en daŭro de unu monato!

Moderne la komunikado de Ĥinujo pli oportuniĝas, tio pli proksimigas la Ĥinojn el ĉiuj anguloj kaj donas al ili la oportunecon interbabilu. Nature la dialektoj unuigas en ne rimarkebla ŝanĝiĝado. Plie, la « Kuo Ju » (Ĥina komuna lingvo arte ordigita) nun disvastiĝas en tuta Ĥinujo kiel Esperanto en la mondo. Mi pensas, ke post kelke da jaroj la malsimileco de Ĥina buŝa lingvo malaperos gradete dank' al la neceseco de l' popola komunikado kaj natura evolucio de l' homa lingvo.

La disvastiĝo de Esperanto estas pro la sama kaŭzo, kaj kompreneble ĝi ŝanceligos la malhelpon naskitan de l' nacilingvoj kaj unuigos la homaron tiel facile kiel la Ĥina lingvo.

(El *Verda Lumo*)

K. Ĉ. Ŝan

Kiom kostas edzino.

Ĉe sovaĝuloj viro, kiu volas preni junulinon kiel kunulinon de sia vivo, anstataŭ peti dotajon, devas pagi al ŝia patro, kiu estas la absoluta posedanto.

Jen kiom kostas infanino en iaj landoj:
Aŭstralio: - tranĉilon, kaj botelon el vitro.
Abisena: - ĉevalojn, ornamajojn, kotonajojn kaj ŝtofojn.

Kafra: - de dek ĝis sepdek bovoj.
Fuega: - kelke da tanitaj peltoj.
Ostjaka: - de dek ĝis centkvin-dek rubloj.
Samojeda: - de kvindek ĝis centkvin-dek nordcervoj.

Fannana: - *kuprajn aŭ bronzajn vazojn, metalajn juvelojn kaj kotonajojn.

Pehuenkeka: - batalilojn kaj brutojn.
Terkesa: - batalilojn, brutojn kaj sklavojn.
Mudajana: - por la malriĉuloj sep rupiojn, por la riĉuloj dek bovojn.

Araŭkana: - unu bovon, unu ĉevalon, kaj iajn arĝentajn spronojn.

Amazona: - riĉajn ŝtofojn.
Frizona: - iajn monerojn, kiuj valoras malpli ol unu liron.

Basuta: - dudek bovojn, dek virŝafojn kaj unu ĉevalon.

18-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO kaj INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

EDINBURGO — 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926.

Loka Kongresa Komitato. *Hon. Prezidanto:* John Merchant. *Prezidanto:* W. M. Page, S.S.C. *Vic-Prezidantoj:* William Rae, S-ro G. Senior. *Sekretarioj:* J. M. Warden, F.F.A., L.K., William Harvey, I.S.O., L.K. *Kasisto:* David R. Tullo, S.S.C. *Komitatoj:* F-ino Jane Baird, George Dickinson, David Kennedy, M.A., Robert Stevenson.

Adreso por leteroj. *Sekretarioj,* 18-a Kongreso de Esperanto, EDINBURGO, *Skotlando.*

Aliĝiloj. Disdonitaj pere de Gazetoj kaj de Naciaj Asocioj. Nericevintoj bonvolu peti aliĝilon rekte de la sekretarioj.

Kotizo. 20 ŝilingoj Britaj = proksimume 20 Ger. Rmk., 25 Svis. fr., 12 Nederl. guld., 5 Uson. dol. Oportuna maniero sendi la kotizon, estas per Brita ŝtatbileto por L1 ("currency note, one pound"), havebla ĉe bankoj en multaj urboj, kaj sendota per registrita (rekomendita) letero; aŭ per ĉeko por L 1 : 0 : 3.

Garantia Kapitalo. Jam garantiita L266.

Donacoj ricevitaj. Por Ordinara Kaso L39 Por Blindula Kaso L13. Por Speciala Celo L60: de du malavaraj samideanoj, sub la ĉifra devizo "Smizropga tivüüt hahome un ĉosopjuh."

La unua solvonto de tiu ĉifro ricevos de la donacintoj senpagan kongreskarton.

Somera Universitato. FOLKLORO KAJ POPOLAJ KANTOJ: *Francaj:* Prof-o Th. Cart; *Germanaj:* S-ro Paul Bennemann; *Polaj:* S-ro S. Grenkamp-Kornfeld; *Rumanaj:* S-ro Andreo Ĉe; *Hebreaj:* D-ro Immanuel Olšvanger; *Katalunaj:* S-ro Jaime Grau Casas; *Hispanaj:* S-ro Julio Mangada Rosenörn. LINGVISTIKO: Prof-o W. E. Collinson, Liverpool (Esperanto kiel vojo al la Lingvoscienco — du prelegoj). MEDICINO: Prof-o Odo Bujwid, de la Jagelona Universitato, Krakovo (Homo kaj Mikroboj*); D-ro Pascal Deuel, Leipzig (1. Modernaj Sukcesoj en la Terapio de Ftizo*, 2. Pri la Plilongigo de la Homa Vivo). SCIENCO: D-ro E. E. Fournier d'Albe (temo poste anoncota). Ing-ro Rinaldo Orenge, antaŭe en la Astronomia Observatorio de Firenze (La Suno: du prelegoj*). D-ro Alfredo Stromboli, el Pisa (Elektrometalurgio en Italujo*). INTERNACIA LABOROFICEJO

* Kun lumbildoj.

de la Ligo de Nacioj. S-ro C. C. Tarelli, oficiala delegito al la Kongreso, faros du prelegojn pri la I.L.O. (1. Konstitucio kaj Celoj; 2. Laboro kaj Rezultoj).

Patronoj. Lia Princa Moŝto la Duko de Comnaught afable konsentis esti Patrono de la Kongreso. Sur la listo de Patronoj troviĝas ankaŭ la nomoj de la Urbestroj de Edinburgo kaj aliaj urboj, famaj Edukistoj, Parlamentanoj, k.t.p.

Fakaj Kunvenoj. Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn, por ebligi taŭgajn aranĝojn.

Akceptoj. Sabaton, la 31-an de Julio: Bonveniga Akcepto de la Skota Federacio Esperantista kaj de la Edinburga Esperanto-Societo, kaj Interkonatiga Vespere. Filmoj de Skotlando. London, la 2-an de Aŭgusto: Lia Urbestra Moŝto, la Magistrataro, kaj la Urba Konsilantaro de Edinburgo faros Civitan Akcepton al la kongresanoj.

Blinduloj. Laŭ afabla konsento de la Internacia Centra Komitato, Blindaj Esperantistoj povas aliĝi sen pago de kotizo.

Kongresaranĝoj. Diversaj Koncertoj, senpage por kongresanoj (inkluzive de tutvespera koncerto de la fama ĥoristaro, la "Glasgow Orpheus Choir"). Internacia Balo, senpage por anoj, en la plej luksa Edinburga dancejo. Ekskurso tuttaga, ĵaŭdon, la 5-an de Aŭgusto, al belegaj ŝtatoj apud rivero Clyde. Vizito al bela Zoologia Parko, kun apartaj privilegioj. Komuna Kantado, sub gvido de S-ro Harrison Hill. La Loka Kongresa Komitato bedaŭras, ke estas neeble lui teatron.

Fervojobato. Revenbiletoj de ĉiuj Britaj stacioj kaj havenoj al Edinburgo, po 1 1/3 de la ordinara unuvoja kosto.

Loĝado. Aranĝoj pri loĝado bone progresas. Detaloj aperos en mendilo baldaŭ eldonota. Fruaj aliĝantoj havos la unuan elekton.

Ŝparkaso. Almenaŭ unu Brita Esp-a Grupo starigis ŝparkason, por kolekti ĉiusemajne sumojn, eventuale uzotajn por kongresaj elspezoj. Sekvinda ekzemplo!

Aliĝintoj. Ĝis nun aliĝis 309 samideanoj.

o o

Unua Internacia Kongreso de Teknika Gazetaro

(Paris, 1-a ĝis 4-a de Oktobro 1925)

La kongreso okazis sub la patroneco de l' prezidanto de la franca respubliko, ĝia prezidanto estis la organizinto s-ro Moynier, prezidanto de la franca sindikato de teknika gazetaro. — Unu de la programpunktoj estis: «Ĉu la teknika gazetaro favoru la disvolvigon de Esperanto, lingvo internacia?» Speciala komisiono ekzamenis la demandon kaj proponis al la kongreso jenan rezolucion:

„Konsiderante la rezultojn tre favorajn al Esperanto de la Kongreso okazinta en lasta Majo en Paris, kiu kunvenigis delegitojn de 171 Komercaj Ĉambroj, 10 registaroj, 14 komercaj folroj kaj 208 komercaj entreprenoj, apartenantaj al 33 diversaj landoj, krome la reprezentantojn de pli ol 140 sciencaj kaj teknikaj institucioj, apartenantaj al 20 diversaj landoj;

konsiderante la grandajn malfacilaĵojn renkontitajn en la dokumentado pro la pligrandiganta nombro de studoj kaj teknikaj kaj sciencaj laboroj, publikigitaj en diversaj lingvoj;

konsiderante, ke internacia lingvo komune uzata, ĉu almenaŭ por la publikigo de resumoj de artikoloj, ĉu fine por kelkaj internaciaj enketoj, simpligus multe la laboron de dokumentado;

konsiderante, ke Esperanto, kies uzado sin trovas en la komercajn rilatojn dank' al ĝiaj kvalitoj, ŝajnas egale adaptiĝi al la bezonoj de la tekniko kiel al tiuj de scienco,

la 1-a Internacia Kongreso de la Teknika, Komerca kaj Terkultura Gazetaro deziresprimas:

1. ke Esperanto estu uzata en la teknika gazetaro almenaŭ por la redaktado de resumoj, kiuj devus sekvi la publikigon de ĉiuj artikoloj kaj originalaj laboroj en ĵurnaloj kaj revuoj de l' tuta mondo;

2. ke Esperanto estu akceptata, kiel oficiala lingvo, samgrade kiel la naciaj lingvoj, en la internaciaj kongresoj de la teknika gazetaro.“

La kongreso aprobis kaj akceptis la rezolucion.

Agu, Esperantistoj!

La „Internacia Konferenco por uzado de Esperanto en la puraj kaj aplikitaj Sciencoj“

(Paris, 14-16. Majo 1925) unuanime akceptis jenan rezolucion (proponinto: Behrendt, Berlin):

Responde al la danke akceptata propono de la Germana Ligo de Teknika-sciencaj unuigoj, trasdonita de ĝia delegito s-ro Behrendt, la konferenco decidis peti la kompetentajn organizantojn de la Esperanto-movado, ke ili kolektu adresojn de teknikistoj kaj scienculoj interesataj pri tekniko, por aperigi teknikan internacian gazeton en Esperanto.

La citita Germana Ligo estis prezentata ankaŭ en la XVIIa Universala Kongreso de Esperanto (Genève, 2-7. Aŭgusto 1925) per sia ĉefsekretario Dro Freitag, kiu proponis al la Kongreso samsencan rezolucion. La Kongreso unuanime akceptis ĝin.

Sekve: Germana Ligo de teknika-sciencaj unuigoj (Deutscher Verband technisch-wissenschaftlicher Vereine) estas preta, aperigi teknikan gazeton en E., se ĝi ekhavas sufiĉe ampleksan adresaron de teknikistoj, inĝenieroj kaj teknike interesataj personoj ĝenerale, ĉu scienculoj, ĉu industriistoj, kiuj kapablas legi Esperanton. Por starigi tian adresaron, helpu la rezolucion. — La eventuale eldonata gazeto estos sendata senpage al ĉiu konata adreso de la pridirita speco. La afero estas grava. De la Esperantistaro dependos, ĉu la propono de la Germana Ligo povos esti realigata. Mi opinias, ke ne estas necese, speciale akcenti la situacion. Ĉiu serioza, praktika Esperantisto komprenos, pri kio temas. Se la adres-kolektado ne donos sufiĉan rezulton, grava momento ne estos ekspluatita. Kaj poste — simile favora situacio por praktika uzo de Esperanto en tekniko verŝajne ne revenos! — Pri informoj dezirataj oni skribu al: telegraf-direktoro Behrendt, Berlin W 30, Hohenstaufenstr. 24, aŭ al: Deutscher Verband technisch-wissenschaftlicher Vereine, Berlin NW 7, Sommerstr. 4a; tien oni ankaŭ sendu la adresojn.

De vi mem, estimata samideanaro, dependas grava progreso en la Esperanto-movado! Agu laŭ via bontrovo! Kaj agu rapide!

Behrendt

*I MILLE ABBONATI
alla nostra Rivista saranno
presto raggiunti, se ognuno pro-
curerà un abbonato nuovo.*

Esperantista Akademio kaj la eldono de Vortaroj

Kelkaj Esperantistoj plendas, ĉar la Akademio ne eldonas mem plenan vortaron, ian vortaregon. Post D-ro Zamenhof mi ripetas, ke tia ne estas la tasko de la Akademio. Vole nevole *oficialaj* estas ĉiuj prilingvaj decidoj de niaj Lingvaj Institucioj. Se, trograndigante sian rolon, ili prenis sur sin «fari» la lingvon kaj enkonduki mem novajn radikojn, tia agado baldaŭ naskus, okaze de ĉiu novaĵo, senfinajn diskutojn inter Akademianoj, inter Lingvakomitatojn, inter Esperantistoj. La jam sufiĉe grava rolo de la Lingvaj Institucioj estas konservi la Zamenhofan, Fundamentan lingvon, kontroli ĝian evoluadon kaj la pliriĉigon de ĝia vortaro, fine oficialigi tion, kio — estante konforma al la fundamentaj principoj — post praktika uzado montris sin vivkapabla kaj necesa. Oni aliparte ne forgesu, ke la ĉefa fonto de la «neologismoj» por Esperanto, kiel por ĉiuj niaj modernaj lingvoj, estas la teknika vortaro, kiu iom post iom influas la komunan lingvon, kiel la scienco mem la ĉiutagan vivon.

Ĉu tio signifas, ke oni ne devas kuragigi la sindonajn homojn, kiuj prenas sur sin gravajn, plenajn enketojn pri uia lingvo? Ĉerte ne, ĉar iliaj laboroj metode kondukita, kvankam ne oficialaj, povos iam alporti plej grandan utilon, plej ĉikan kunlaboradon al niaj oficialaj Lingvaj Institucioj.

Ĉu tio signifas, ke la Akademio rifuzas sian direktadon, siajn konsilojn al la verkistoj, al la Esperantistoj, kiuj sanceliĝas antaŭ aŭ inter novaj terminoj? Ĉerte ne, kaj la tre kompetenta Direktoro de la «Sekcio pri Komuna Vortaro», Prof. Grosjean-Maupin, estis kaj estas ĉiam preta, kun granda sindonemo, domi la petitajn sciigojn al tiu, kiuj jam sin turnis al li kaj al tiuj, kiuj devus, pli ofte ol ili faras, sin turni al li. Tre prave kaj energie li insistis pri la danĝero enkonduki senpripeno en nian komunan lingvon neologismojn kaj formojn duoblajn por sama ideo! Oni relegu, en *Oficiala Klasika Libro*, paĝ. 3: «Konsiloj pri enkonduko de novaj vortoj».

* *

Kvankam eble kelkaj malice mallaŭdos la ĉiaman ripeton de samaj konsiloj, mi denove imitos la romanon censuron kun lia «Delenda Carthago!» kaj finos per tiuj vortoj:

«Nur per unueco, karaj Samideanoj, ni venkos.

«Unueco estas ebla nur per severa disciplino de ĉiuj akceptita en lingvaj demandoj kaj pri ĉiu detala punkto.»

Tion mi ne plu ripetas, se mi estus konvinkita, ke fine ĉiuj same opinias sed....

*Ĝe guto malgranda konstante frapanta
Traboras la monton granitan!*

Prezidanto de la Lingva Komitato
kaj de ĝia Akademio
Th. Carl

ITALA KRONIKO

Altare. Laŭ iniciato de s-ro Ivano Bordoni kaj de tre agema pastro Pirotti fondiĝis nova Esperanta Grupo.

Genova. Ankaŭ nunjare, kiel jam de du lernjaroj, la Komunuma Aŭtoritato starigis regulajn devigajn E. kursojn en sep klasoj de vespera komplementa urba lernejo «Gerolamo Boccardo» (Piazza delle Vigne), gvidataj de rajtigita instruistoj de la Liguria Esperanto Instituto (sekcio de Itala Katedro de E.).

Parma. La 5-an de majo inaŭguro de Zamenhofa busto, skulptaĵo de Sam. Prof. G. Cacciani.

Perugia. La 26-an de marto okazis la fondiĝkunveno de nova E. Grupo. Estraro: Mosci instruistino Letizia, Marinelli adv. Astorre, Boccioni aktisto Nazareno. Sidejo ĉe s-ro Boccioni, Via dell'Elce di Sopra.

S. Croce di Trieste. La 14-an de marto vizitis nin la Triestaj gesamideanoj, inter kiuj la prezidanto de Triesta E. Klubo, d-ro kav. A. Ghez, kiu post bela parolado donacis al nia klubo la buston de nia granda Majstro Zamenhof, skulptita de Triesta samideano Camaur. Per belaj vortoj deziris al ni progreson kaj laboron f-no prof. Wanda Asquini.

* Ekskursema grupo faris sian unuan ekskurson sur la monten Sankta Leonardo la 21-an de marto. 48 Partoprenantoj.

Torino. La 4-an kaj la 11-an de marto ĉe la sidejo de Torino E. Asocio okazis eksterordinara kunveno de la societanoj por la aprobo de kelkaj reformoj al la socia regularo kaj la elekto de la estraro por la nuna jaro. Unuanime estis elektita prezidanto Ing. Johano Cenere, vicprezidenton s-on Fiandra, konsilantoj s-roj ing. Pakner, d-ro Canuto, La Colla, Falletti, Ramolfo, sindikoj s-roj kav. Saccani kaj Palumbo.

Trieste. La 25 de februaro okazis la kvina ĝenerala kunsido de nia Rondo. Post memorigo pri la mortinta samurbano senatano Hortis, oni rilatis pri la ampleksa laboro farita dum la pasinta jaro. La financa raporto donis la jenajn rezultojn: enspezoj L. 3960 kaj elspezoj L. 3320.95


Oni elektis poste la novan estraron, kiu tiel rezultis: Kav. prof. d-ro Ghez, prezidanto, d-ro Polidori, v. p., f-no Asquini, sek., Rattissa, Cosmaz, Levi, kons., Milloch, Löw, Verdi, revizoroj.

Bone sukcesis festo pro naskiĝtago de f-no Asquini kaj eskurso al vilaĝo Santa Croce.

Al sam. Höller mortis edzino. Korajn kondolencojn.

Vicenza. Esperanta Rondo tre bone prosperas: formiĝis E. Fervojistaj kaj Poŝtoficeistaj Grupoj.

Voghera. La 13-an de aprilo en la granda kaj luksa salono de la ĉi tiea «Unione Ginnastica» d-ro A. Stromboli faris plensukcese publikan paroladon kun lumbildoj pri «La internaciaj sciencaj kaj komercaj interrilatoj kaj la defendo de la itala lingvo».



menco. Sekvas praktikaj tre instruivaj artikoloj pri konstruado, kaj scienc-elementa bablado. Nek mankas radio-humoro, nek sciigoj aktualaj pri la internacia vivo de la radiomondo.

La pli speciale esperantista parto konsistas el artikolo de D-ro Corret pri la grava temo de nia teknika vortaro; el oficiala parto pri Int. Radio-Asocio, kaj el sciigoj diversaj pri Esperanto, inter kiuj plurlingva noteto pri la celo kaj esenco de la lingvo mem.

Mirinda kaj senrezerve laŭdinda estas la presado, belegaj la bildetoj kaj figuroj: nur unu presaron ni renkontis dum tuta atenta tralegado! Kaj ne malpli altvalora estas, kompreneble, la lingvo, ŝuinta el plumoj prave ŝategataj inter ni. Tamen ni ne povas preterlasi iujn detalajn rimarkojn pri kelkaj teknikaj terminoj.

Anstataŭ **kondukema** ni preferas **kondukt-iv-a**. La sufikso **-iv-** (**izollva, peziva**) estas pli teknika: ĝi montras karakteron *esencan*, dum **-em-** plibone *okazan*. Plie ĝi tre utilis por la *koefficientoj de propreco* (**kondukt-iv-ec-o, rezist-iv-ec-o**, ktp.). Pri la radiko **kondukt-** (uzata en nia itala-esp. «Radioteknika Terminaro»¹⁾ por la fizika senco, lasante al **konduk-** la ordinaran) ni volus rimarkigi ke ĝi apartenas al familio de radikoj kiel

kondukt-i	kondukt-iv-a	kondukt-anc-o	kondukt-o-ro
indukt-i	indukt-iv-a	induk-anc-o	indukt-o-ro
reakt-i	reakt-iv-a	reakt-anc-o	reakt-o-ro

Komparu: **produkt-i** (F.) **produkt-iv-a** **produkt-or-o**
kaj ne **produk-i**:

kaj *fakte* ankaŭ la antaŭaj aŭtoroj de radioterminaroj akceptis la radikon **kondukt-** ĉar ili enkondukis la vortojn **konduktanco konduktoro**, pri kiuj oni nepre ne povas kaŝi, ke la finaj **-anco -oro** havas ĉe ĉiuj naciaj lingvoj *sufiksajn karakteron* je la plej alta grado.

Enkonduko de radikoj **kondukt- indukt- reakt-** (lasante al **konduk-** la nesciencan sencan, forigante **induk-** kaj lasante al **reakt-** la politikan k. kemian sencojn) donus la neforjetindan utilon perfekte reguligi vortogrupejn kiuj estas teknike gravaj kaj estas regulaj eĉ ĉe la naciaj lingvoj.

Kial **iono** kaj ne **jono**? Ni havas ekz. **jodo** n. Ankaŭ **interfero** estas laŭ ni malkonsilinda. La ĝusta formo **interferenco** estas vere in-

¹⁾ kajere aperanta ĉe *Radio Novità* — *Wireless News-Radio-Newselles*, Roma, Via Lucca 10.

ternacia, ĉar ĝi aperas en DEFRIH: aliparte **interfero** povas esti **inter-fer-o**, france **entrefer**, itale **interferro**, hispane **entrehierro**, aerspacio inter **indukt-or-o** kaj **indukt-at-o**, ekz. en dinamo.

Ni ne komprenas **gaz-ĉar-gas-** estas Fundamenta. Anstataŭ **primario**, **sekundario**, ni preferus, kiel Ido, **primaro**, **sekundaro**. La [dua estas jam en aliaj teknikaj vortaroj (ekz. **fervoja**) en ĉi tiu formo.

Kial **kontinua kurento dum samsenca fluo** estas pli klara kaj jam Fundamenta? Certe D-ro Corret samopinias je ni, ke ni devas akcepti utilan radikon eĉ se ne nepre necesan, por pliperfektigi la lingvon, sed absolute ne pezigi ĝin per senutilaj lacigantaj kaj komplikigaj duoblaĵoj. Esperanto ne celas nur latinojn kaj anglojn, jam tro favoritajn.

Kondukebleco anst. **konduk(t)iveco** (paĝ. 14 lin. 15) aspektas erare. **Borno** estas alia duoblaĵo: **klemo** sufiĉas.

Pri **ŝargi** (akumuladorojn, ktp.) « c'est la faute à Verax », kiel pri **interfero**, sed malpli pravigeble. **Ŝargi** estas F.-aĵo, kaj certe la sola ĝusta vorto.

Ni preferus **mikrobion** anst. **mikrobon**. La greka deveno estas klara, kaj ni havas, ĝuste, **amfiblon**. **Relajo** anst. **relajso** ne tre multe plaĉas, kaj skribe estas malpli rekonebla.

Kaj jen ni estas ĉe la eble plej grava punkto. Ĉu S-ro D-ro Corret, kiel aŭtoro de la 6-lingva **Leksikone**, akceptus la proponon forigi el nia radio-vortaro la terminojn kiel **alternator-**, **akumulator-**, **amplifikator-**, **konduktor-**, **komutator-**, ktp.? Ili devenas en la latinidaj lingvoj, regule, de radikoj **altern-**, **akumul-**, **ampl-**, **kondukt-**, **komut-**, ktp.: la plejparto el ĉi-lastaj ankaŭ estas bezonata kaj akceptita de Esperanto. Kial ne akcepti ankaŭ en nia lingvo — la lingvo **regula** pro ĉefa sia eco — regulan devenadon? La sufikso **-il-** estas ne bona ĉar ĝi donas **mortajn** vortojn tro malproksimajn de la internacia formo; cetero **-ilo** ne taŭgas: **rabot-il-o** ne estas **rabot-ad-or-o**, maŝino por **rabotadi**. Sed tiu-ĉi sufikso **-or-** = **aganto**, kiu aŭ **kio kreas, produktas, generas, prizorgas** (itale **-ore**, france **-eur**, angle **-er**, hispane **-or**) al ni konsilita de P-ro Migliorini, Akademiano, estas laŭ ni perfekte bela kaj inda. Ni havus do

anst. izolatoro izol-il-o
 » akumulatoro akumul-ad-or-o
 » kondensatoro kondens-ad-or-o, ktp.

Ne tro da matematika reguleco, kaj ne tro da laŭnombra internacieco: sed feliĉe, ĉu ne? kiam oni povas atingi ambaŭ! Pri **amplifikatoro**, ĉu ne ŝajnas al D-ro Corret ke la formo **ampl-ig-ad-oro** estas dekfoje pli esperanta kaj samtempe sufiĉe internacia?

Kaj jen ni prezentis **ĉiujn** de ni rimarkitajn, ĉu **nekoncilindajn** vortojn, ĉu **eble anstataŭendajn** per aliaj pli taŭgaj formoj. Ĝia malgranda nombro plejbone pravas kiom valoras ankaŭ je tiu ĉi flanko la nova revuo.

Ni ne scias do kiel sufiĉe rekomendi al ĉiu radioamatoro la novan eldonadon, kaj precipe la varbadon pri anoncoj, kiuj nure povos igi ĝin potenca organo internacia.

Kiu povas, tiu postulu specimenon adresigante ĝin ĉe konata radio-firmo aŭ gazeto: kaj skribu rekte al ĉi-lasta, petante akcepti mallongan favoran recenzon. ro

E. PRIVAT, **Karlo**. *Facila legolibro*. Esperanto Verlag Ellersiek kaj Borel, Berlin kaj Dresden, 1926, pp. 46, M. 0,50.

Naŭa eldono (31-a ĝis 40-a miloj) de la konata malgranda romano de Privat. Ni travivas kun Karlo la infanecon, la lernejon, la studadon; ĉio estas nete kaj arte priskribita. E. M.

E. PRIVAT, **Kursa Lernolibro**, laŭ praktika parola metodo. Esperanto-Verlag Ellersiek kaj Borel, Berlin kaj Dresden 1926, pp. 48, M. 0,80.

Sesa eldono (23-a-30-a miloj) de la Privat'a lernolibro, kiu celas helpi la instruantojn por lernigi la tutan gramatikon de la lingvo, preskaŭ ne parolante pri ĝi, sed per konstanta parola uzado de ekzemplaj frazoj aranĝitaj en konversacia maniero ». E. M.

M. BUTIN, **Esperanto-Leitfaden für den Kaufmann**, Berlin-Dresden, Ellersiek & Borel, 1926, pp. 64, M. 1.

Post franca *Cours commercial d'Esperanto* de L. Marissiaux, aperinta jam antaŭ multaj jaroj, kaj angla *Pitman's Commercial Esperanto* de W. M. Page, jen germana lernolibro por komercistoj, prilaborita (laŭ tiu ĉi angla verko) de s-ro M. Butin, L. K. Ĝia aranĝo rimarkinde praktika igas ĝin unu el la plej bonaj faklernolibroj. B. M.

Tipografia Editrice A. Paolet, S. Vito al Tagliamento
 A. Paolet, cir. 1927.

351. Dalleolle Arturo, soldato
2-o Reclus. MIL., 1-o Rep. GAETA
352. Gruppo Esperantista Operato
Casella Postale 922 GENOVA
353. Barni sig. Giovanni
Corso Sardegna 73/2 GENOVA
354. Grazzini prof. Corrado
Via de' Neri 6 FIRENZE 18
355. Zunino sig. Silvio
Via Caffa 13-15, Sc. A GENOVA
356. Friscione sig. Luigi
Viale Varni 15/1 GENOVA
357. Cerri sig. Corrado
Via Vittorio Veneto AREZZO
358. Emolo sig. Stanislao
Collegio Savoia (Napoli) OTTAIANO
359. Di Tommaso sig. Stefano
Corso Garibaldi (Teramo) TORRE DE' PASSERI
360. Ferraris sig. na Gianna
Via XX Sett. 20 PIACENZA
361. Tellini rag. cav. Edoardo
(Friuli) TRICESIMO
362. Libreria Bemporad
Sotto Borgo PISA
363. Libreria Pacinotti
Via Cino PISTOIA
364. Barbieri sig. Giuseppe - Viale Umberto I
Trattoria Pipelli (Pavia) VOGHERA
365. Giani grand. uff. avv. Giuseppe
Via Piave 9 TORINO
366. Maula sig. Carlo
Via Monterosa 42 TORINO 15
367. Gallinella sig. Tonino
Via Collegio Maria Luigia 11 PARMA
368. Matti sig. Dino
(per l'Erta) MONTELUPO FIORENTINO
369. Rotondo mons. prof. Giovanni fu Michele
Corso Mazzini 75 BARI
370. Sacerdoti sig. a Clara
Via dei Gracchi 278 ROMA
371. Lazzari sig. a Clotilde
Via Conte Verde 34 ROMA
372. Borel sig. Jean
(Genova) RECCO
373. Ometti sig. Luigi
Via Varesina 53 B - Rep. Musocco MILANO
374. Baseli sig. Dante
Via Luigi Cagnola 9 MILANO 26
375. Gorla sig. Reale
Via Cavour 8 (Como) BINAGO
376. Bianchi sig. Mario - Via Mazzini 4-6
(Como) MALNATE PER GURONE
377. Barbesta sig. Mario
(Pavia) LANDRIANO
378. Billet sig. Guido
Ufficio Speciale - Ministero Interni ROMA
379. Associazione Pensionati Civili e Militari
Via Maggi LIVORNO
380. Ricci capit. Giorgio - Segret. Gen. Sindacato
Nazionale Lavoratori dei Porti - P. Colonna 366 ROMA
381. Circolo di Riunione
(Calabria) PIZZO
382. Circolo "Italia",
(Egeo) RODI
383. Scuole Femminili "Vuvalion",
(Egeo) CALIMNO
384. Municipio di
LIVORNO
385. Circolo Mandolinistico "Verdi",
Teatro S. Marco LIVORNO
386. Maraz sig. Luigi
(Venezia Giulia) BISTERZA 78
387. Maffei sig. Giuseppe
S. Geremia 261 VENEZIA
388. Olmini sig. Enrico
S. Stae 1972 VENEZIA
389. Seves sac. prof. Carlo, arciprete
(Piacenza) AGAZZANO
390. Decleva sig. Antonio
Via Orlandini 175 TRIESTE 16
391. Camurri sig. Riccardo
Corso Vitt. Em. 305 ROMA
392. Matano sig. na Beatrice
Via Paolina 1 ROMA
393. Donnini sig. na Wanda
Via Porto Maurizio 11 ROMA
394. Tegoni prof. a Elisa
Via Gioberti 8-9 SAMPIERDARENA
395. Carlani sig. Ennio
Via Buttrio 3 UDINE
396. Crestoni rag. Alfredo - Vice Direttore
Banca Popolare (Verona) LEGNAGO
397. Boccella sig. a E. F.
Piazza Duomo 4 (Bologna) IMOLA
398. Cadario Casare, Maresciallo Magg. CC. RR.
Stazione Principale (Genova) SESTRIPONENTE
399. Warth sig. Teodoro
Viale Certosa 29 (Milano) MUSOCCO
400. Ruschena sig. Clelio
Via F. Aperti 42 MILANO 38

401. Jantelli sig. Arnolfo, pubblicista Via E. Perroni 37 (Firenze) SIGNA	426. Ill.mo Signor Prefetto LIVORNO
402. Lacalendola prof. Adamo Via Dante 323 BARI	427. Morra sig. Raffaele Via Craneri 39 ² (Cuneo) FOSSANO
403. Accademia Balcanica Esperantista Via Abate Gimma 52 BARI	428. Vassura cav. Andrea - Console T. C. I. Via S. Bruno 8 FORLÌ
404. Agazzani sig. Carlo - Lanificio Azario (Torino, Ivrea) STRAMBINO	429. Camera di Commercio PIACENZA
405. Marzio sig.a Carlotta Via S. Vittore 8 MILANO 16	430. Finardi sig. Ernesto Via Castelvetro 3 MILANO 30
406. Treccani sig. Enrico Via Ciro Menotti 5 MILANO 20	431. Zaniboni sig. Mario Via Candiani 2 - Rip. Bovisa MILANO
407. Coen sig.a Ida Via Cola di Rienzo 271 ROMA 31	432. Giovannoni sig. Giovanni Via Candiani 1 - Rip. Bovisa MILANO
408. Hierl-Cerutti sig.a Maria Via Quintino Sella 23 ROMA	433. Ballerini grand' uff. Fortunato Via Collina 24 ROMA
409. Simonetti Giovanni, maestro Scuole Elem. Via G. Verdi 7 TRENTO	434. Baretti sig. Bruno Via Toscana 42 ROMA
410. Cristofoli sig. Giorgio Via S. Croce 3 TRENTO	435. Torta ing. Pietro S. Stefano 3419 VENEZIA
411. Pellico sig. Edmondo Via del Greci 10 ROMA 8	436. Andreetti sig. Armando Via Emilia 15 BOLOGNA
412. Prato sig. Giovanni Corso Re Umberto 48 TORINO 18	437. Simoni sig. Giuseppe Piazzetta del Teatro Garibaldi 2 PADOVA
413. Gandolfi sig. Vittorio Via Ormea 126 TORINO 20	438. Castelli rag. Leone Corso Vitt. Em. II, 3 b PADOVA
414. Valsecchi sig. G. B. Cannaregio 2347 VENEZIA 16	439. Secchieri sig. Guido Canareggio 5623 VENEZIA
415. Arru dott. Giov. Antonio (Sassari) VILLANOVA MONTELEONE	440. Raini sig. Francesco R. R. Poste MANTOVA
416. Aetis sig.na Rina Via Morosini 17 TORINO	441. Avanzini Don Dante (Parma) SORAGNA
417. Schmuckher dott. Aldo Corso Torino 31-14 GENOVA 9	442. Albano sig.a Adele Via Thesauro 3 TORINO 6
418. Maglia prof.a Adele Corso Torino 31-19 GENOVA	443. Russo Morasoli sig. Vincenzo Via Coppola 64 CATANIA 28
419. Sala Zanchini sig.a Ida Via Ausonio 7 MILANO 16	444. Associazione Esperantista Torinese Via Arcivescovado 1 a TORINO
420. Zinna dott. Vincenzo (Napoli) OTTAIANO	445. Circolo Ricreativo Esperantista Via della Libertà 15 GENOVA
421. Annunziata avv. Mario (Napoli) OTTALIANO	446. Francescangeli sig. Eraldo Via Mentana TERNI
422. Rossetti sig. Alberto Via del Camposanto 48 LIVORNO	447. Puppo sig. Giuseppe Via Marasso 10 (Genova) QUINTO AL MARE
423. Mariani sig. Luigi Scala Rossano 2 POTENZA	448. De Grada sig. Giuseppe Via A. M. Maragliano 17-6 GENOVA
424. Circolo Filologico ANCONA	449. Talpone sig. Pietro Via S. Donato 29 TORINO
425. Circolo "B. Mussolini,, (già Impiegati Civili) ANCONA	450. Stefanin sig. Angelo Castello 2643 VENEZIA

KORESPONDADO

(Ciu vorto L. 0.10 - Minimume L. 1) —

ITALIO

Firenze (Firenze) — S.ro Gino Catarzi, ĉefredaktoro de «*Italio*» e, interŝanĝas tradukojn de naciaj noveloj kun korespondantoj.

MAROKO

Marrakech, — S.ro Touque Edmond, forestier, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. poŝtk.

SOVETLANDO

Moskoo, Kalanĉevskij, per-dou 22/24, kb. 13 — S.ro A. Milovidov deziras korespondi kun majstro preparanta balotajn pantolojn por artistoj de Milano kaj aliaj teatroj.

Prof. Jezerski petas ĉiujn gesamideoanojn, ke ili bonvolu skribi al li sian opinion pri la de li projektita universitata kurso, kiu en anoncis en nia marta kajero, kaj ke ili propagandu tiun ideon en la ĵurnaloj. Lia adreso estas: Skrytka poztowa 18 — Lida (Polio).

I Sostenitori dell' I. E. R.

Eraldo Francescangeli, Torul L. 5

RADIOFONIA

RIVISTA QUINDICINALE

DI RADIOELETTICITA'

Il giornale che fra i primi in Italia, accettando l'idea della diffusione dell'Esperanto nelle comunicazioni della Radio, con la pubblicazione del Corso di Esperanto e del Calendario Radio-Esperantista, merita avere la maggiore divulgazione tra i samideani.

Abbonamenti:

6 mesi L. 22, 12 mesi L. 40
(estero, 6 mesi L. 25 - 12 m. Lesi 46)
Un Numero L. 2

Redazione ed Amministrazione:

ROMA, Via del Tritone 61.

Cesare Botticelli

INDUSTRIO KAJ FABRIKO
DE

Veneciaj "Conterie,, (Perloj)

VENEZIA - Via 22 Marzo N. 2242

TELEF. 2716

Speciala fabriko de

PERLAJ MANPOŝOJ POR SINJORINOJ

KOLĈENOJ KAJ BRAKĈENOJ

VENECIAJ GRAVURITAJ LEDAĴOJ

KAJ MOZAIKOJ

MODERAJ PREZOJ

ONI KORESPONDAS ESPERANTE

Liveranta Firmo de Esperanta Komerclista
Grupo en Dresdeno

MATERIALE PER PROPAGANDA.

In relazione al deliberato del X Congresso circa la soppressione dell'Ufficio Librario della F. E. I. che funziona tuttora in via di liquidazione a Verona a cura di ex benemeriti dirigenti della Federazione stessa, ed alla autorizzazione accordata dal nuovo Direttorio in seduta del 18 novembre, sono stati combinati i seguenti pacchi di pubblicazioni e sottoprezzo per facilitare l'opera di propaganda che ogni buon samideano sente il dovere ed il piacere di compiere:

PACCO TIPO A (ne sono disponibili 100) contiene: nove esemplari del quaderni della F. E. I. (1 del I, 1 del III, 3 del IV, 1 del V, 3 del VI), quattro «*Esperanto in un foglio*», due «*Autorevoli Consensi*», una cartolina ritratto Eschenhof, dieci «*Manuali della F. E. I.*», due altri opuscoli a scelta secondo le disponibilità. Franco di porto L. 12 (valore di copertina L. 54).

PACCO TIPO B (fino ad esaurimento delle disponibilità): sedici quaderni della F. E. I. (1 del I, 1 del II, 2 del III, 1 del IV, 2 del V, 5 del VI), un opuscolo Piatti, dieci «*Esperanto in un foglio*», cinque «*Autorevoli Consensi*» recenti, due bollettari quitance, venti «*Manuali della F. E. I.*», oltre alcuni opuscoli di propaganda. Franco di porto L. 25 (mentre il prezzo di copertina o di stampa è di L. 100).

A chi ordina due o più pacchi contemporaneamente sarà inviato in aggiunta, a titolo di premio, altro materiale da questo disponibile.

nessun esperantista e specialmente nessun Gruppo dovrebbe tardare ad arricchire la propria biblioteca ed i propri usi di propaganda, corrispondendo nello stesso tempo ai generosi sacrifici di chi ha con amore diretta la famiglia esperantista italiana.

Le richieste, con relativo vaglia, debbono essere dirette ad onore Rag. Amerigo L. Reni, Via G. Mameli n. 2, VERONA. Prezzo lo stesso e iste sempre la rappresentanza esclusiva di una importante fabbrica di distintivi esperantisti. Chiederne elenco e prezzi.

LIBRERIE ITALIANE

CON DEPOSITO DELLE NOSTRE EDIZIONI ESPERANTISTE

- ANCONA — Libreria Giuseppe Fogola — Corso Vittorio Emanuele.
BELLUNO — Libreria Silvio Benetta.
BRESCIA — Libreria Angelo Delai — Palazzo Broletto 1.
FANO — Libreria Eredi A. Bazzani — Via XX Settembre.
FERRARA — Libreria Taddei — Piazza Pace 31-37.
FIUME — Libreria Popolare — Corso Vittorio Emanuele III 39.
GENOVA — Libreria Internazionale Fratelli Treves — Via Arcivescovo 1.
„ — Filiale della Società Editrice Internazionale di Torino — Via Petrarca 22-24 r.
LIVORNO — Libreria Belforte — Corso Vittorio Emanuele.
MANTOVA — Libreria G. B. Bertani — Corso Umberto I.
MILANO — Libreria Ulrico Hoepli.
„ — Libreria G. B. Paravia & C. — Galleria De Cristoforis.
PADOVA — Libreria Angelo Draghi — Via Cavour 7-9.
PALERMO — Libreria Giuseppe Pantaleone — Via Roma, 2° Tronco, Angolo Via Giovanni da Procida.
PARMA — Società Editrice Internazionale — Via al Duomo 20-26.
„ — Libreria Lorenzo Vannucci — Via Farini 40.
PLACENZA — Libreria Ludovico Maserati — Corso Vittorio Emanuele II, 72.
PISA — Libreria Bemporad — Sotto Borgo.
„ — Libreria Spoerri — Lungarno Regio.
PISTOIA — Libreria Pacini — Via Cino.
PRATO — Libreria Bertelli — Corso Amedeo.
PORTOFERRAIO — Libreria Umberto Zampieri.
ROMA — Libreria Modernissima — Via delle Convertite 18.
„ — Libreria Liberman — Via Ludovisi 37.
SPEZIA — Libreria della Marina, di Achille Zacutti.
TORINO — Libreria G. B. Paravia & C.
„ — Libreria S. Lattes & C. — Piazza Castello, Via Garibaldi 3.
„ — Libreria Alleanza Cooperativa — Via Genova, Angolo Via Bertola.
„ — Libreria di Cultura Italiana e Straniera — Via Roma 4.

Internacia Medicina Revuo

depost januaro 1925 estas eldonita sur tute novaj bazoj. Ĉefredaktoro: Profesoro Vanverts el Lille. Kunlaborantaro el ĉiuj landoj. Enhavo: originalaj artikoloj; aŭtoreferatoj; referatoj; komunikajoj de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Diversaĵoj.

Abono: 1 Dollaro, aŭ samvaloro.

Pri sciigoj, sendo de dokumentoj, k.t.p., sin turni al Redakcio kaj Ad ministracio: D-ro Briquet, rue de la Bassée 31, Liège (Franclando)

:: :: LA SOLA :: ::
arta literatura monata esperanta revuo
estas

Literatura Mondo

Po N-ro sv. fr. —.80
Jarabono por Italio L. 44.

Favora prezo por la abonantoj de I.E.R.:
jarbono L. 38

Questo numero doppio costa L. 2.